

## **Jens Galschiot - Skulptisto**

Banevaenget 22 - DK-5270 Odense N

Tel.: (+45) 6618 4058 - Fakso: (+45) 6618 4158

Retpoŝto: [aidoh@aidoh.dk](mailto:aidoh@aidoh.dk)

TTT: [www.aidoh.dk](http://www.aidoh.dk)



Odense, la 24-an de aprilo 2003

Al la esperantistoj de Milano, saluton amikoj!

Ni supozas ke la jubileo de *Mia Interna Besto* kaj la serĉado de la skulptaĵo estas afero kiu eble interesus vin. Eble vi povus eĉ kontribui.

Tiurilate ekzistas pluraj ebloj:

Turni vin al la urba registraro demandante pri la sorto de la skulptaĵo.

Kontakti kontraŭrasismajn kaj aliajn NRO-jn pri la afero.

Furori en la gazetaro.

Sendi al ni retajn kaj poŝtajn adreseojn de la loka gazetaro.

ktp. ktp.

La celo estas fokusi al la jubileo, ne ĉefe por ke la *Besto* povu memfide diskonigi sin, sed por stimuli publikan debaton pri la afero kiun la skulptaĵo simbolizas: batalo kontraŭ rasismo kaj maltoleremo.

Informojn vi trovas en la ĉemetita materialo kaj en interreto: [www.aidoh.dk](http://www.aidoh.dk)

Ni esperas pri fruktodona kunlaboro.

Kore salutas

s-ro Jens Galschiot (skulptisto)

kaj s-ro Vagn Frausing (internacia sekretario)